MINIMUMA LINGVOPRINCIPO

La unuaj gramatikistoj de la latinidaj lingvoj simple imitis la malnovajn, sed forgesis, ke la vorto *subjectum* de la latina aludas ion *submetita*, kaj sekve de tio la divido de la frazo en subjekto kaj predikato estas eĉ etimologie erara.

Efektive, ĉiu esenca elemento sin ligas duope al ĉiu el siaj akcidentaj elementoj, kies ekzisto dependas de lia ekzisto.

La penso de la parolanto vidas la fakton, kiu reaperas ĉe ĉiuj eroj: kondukanto, kandukato kaj vojo. Kiam la penso fariĝas vorto, tiam la fakto estas simple faktorigata kaj estas unu solan fojon parolata kaj aŭdata [la punkto markas interrilaton]:

soldato	kondukas	
	kondukas	arestiton
	kondukas	tra strato

soldato kondukas arestiton tra strato

La sencaj lingvoproceduroj povas esti resumataj per la sekvanta diagramo:



La sinsekvo de morfemo, vorto, lokucio, sentenco kaj frazo provokas la aperon de kvin niveloj, kiuj cxiam ekzistas en ordinara lingva informo.

La horizontala proceduro havas koheron [.], kiu el sinsekvaj eroj de unu nivelo faras eron de la sekvanta nivelo, kaj samordigon [+], kiu el sinsekvaj eroj de unu nivelo faras pli longan eron de la sama nivelo.

Kohero ligas morfemon al morfemo [M: morfemo] por formi vorton, vorton al vorto [V: vorto] por formi lokucion, lokucion al lokucio [L: lokucio] por formi sentencon kaj sentencon al sentenco [S: sentenco] por formi frazon.

La paro estas la bona konduto en lingvo, sed ofte aperas frauxlinoj [malsupre la sola sentenco kaj la sola frazo]:

la		sun		o		ne		bril		as
M		M		M		M		M		M
V		V				V		V		
L						L				
S										
F										

:

Kohero kreas funkciojn, kiuj estas lokoj por okupanto:

Por tiu, kiu sin ligas individue al ĉiu alia, la funkcion de esenca elemento [E].
Por tiu, kiun alia forigas per sia forigo, la funkcion de akcidenta elemento [A].

Esencaj morfemo [EM], vorto [EV], lokucio [EL] kaj esenca sentenco [ES] estas naturaj paroj por formi aron per du eroj:

ne	vidante	la	kuzon	la	viro	ne	restis
AV	EV	AV	EV	AV	EV	AV	EV
EL		AL		AL		EL	
AS				ES			
F							

Samordigo ligas morfemon al morfemo por formi pli longan morfemon, vorton al vorto por formi pli longan vorton, lokucion al lokucio por formi pli longan lokucion, sentencon al sentenco por formi pli longan sentencon kaj frazon al frazo por formi pli longan frazon. Membroj de samordigo necese apartenas al la sama vortogrupo kaj havas la saman funkcion esenca aux akcidenta [k kaj]:. En lamalsupra ekzemplo estas samordigoj de morfemoj, vortoj kaj lokucioj [grase indikitaj]:

de	k	Al	tie	ulo	alta	k	ega	iras	k	kuras
M	+	**M**								
M		M	M	M	M		M	M		M
				V	+		**V**			
V			V	V				V		V
								L	+	**L**
L			L				.	L		
S			S							
F										

La vertikala proceduro havas superordigon, kiu per promocio portas eron de malalta nivelo al pli alta sen ia marko krom la videbla foresto de atendataj eroj, kaj subordigon, kiu per degrado portas eron de alta nivelo al malalta kun ia marko en sia komenco.

Per superordigo morfemo, vorto, lokucio kaj sentenco supreniras al pli altaj niveloj. Mi ekzemplas per tri ekkriaj supereblecoj [grase indikitaj]:

ek
M
V
L
S
F

fajro
V
L
S
F

bela	nokto
V	V
L	
S	
F	

Per subordigo frazo povas fariĝi sentenco, lokucio, vorto kaj morfemo, sentenco povas fariĝi lokucio, vorto kaj morfemo, lokucio povas fariĝi vorto kaj morfemo kaj vorto povas fariĝi morfemo. Mi ekzemplas nur per la subordigo de frazo al sentenco kaj de sentenco, de lokucio kaj de vorto al morfemo.

La subordigo de frazo estas tre ofta [x = fraza subigilo]:

se	patrino	kaj	infano		dormas	kaj	sonĝas		patro		viglas
	V		V		V		V		V		V
	L	+	L		L	+	L				
	L			.	L				L	.	L
	S										
x	F										
S								.	S		
F											

La subordigo al morfemo estas tute regula, sed estas restriktoj kaj permesoj, kiujn ĉi tiu resumo preterlasas, krom la sekvanta:

ĉiu gramatika sufikso estu senescepte forigata antaŭ klasa sufikso substantiva [-o], adjektiva [-a], verba [-i] kaj adverba [-e]. Sekve de tio, antaŭ la finaĵo de klaso malaperas la sufiksoj de klaso, de akuzativo, de pluralo kaj de verbomorfoj estanta, estinta, estonta, kondiĉa kaj ordona. Se ne temas pri la vorta finaĵo, la reteno aŭ la forigo de substantiva kaj adjektiva finaĵoj dependas nur de la prononcebleco, sed laverbaj estas neeblaj.

Al ĉia vorta subordigo devas respondi kohera esprimo, kiu tamen ne ĉiam havas la saman sencon:

Ne ĉiu *domo de urbo* estas *urbodomo*.

La subordigita vorto fine kaj senescepte devas esti reduktebla al la tri sinsekvaj morfemoj de la ordinaraj koheraj vortoj:

vort mal re		ar facil far		o a i
1-a morfemo	.	2-a morfemo	.	3-a morfemo
Vorto				

Al ĉiu el la du unuaj pozicioj de morfemo vorto, lokucio, sentenco kaj frazo povas subordiĝi, sed neniam al la tria:

Elemento	1-a elemento		2-a elemento		3-a elemento		Rezulto
Vorto	akvo		fal		o		Akvofalo
Vorto			konstrui		o		Konstruo
Lokucio	multaj nacioj		ec		o		multnacieco
Lokucio			bela korpo		a		belkorpa

Tia redukto al senescepte trielementa vorto estas rezulto de la infinite produktema ebleco subordigi lonan aron al samsenca erro, nun parto de alia erro por formado de alia aro.

En la evoluo de la unua lingvo unue estis ni malkovris la koheron, sekve la superordigon, poste la samordigon kaj fine la miraklon de la subordigo, kies amplekson

multaj lingvoj perdis en sia historia avanco al la nuntempo, sed ne Esperanto, kies subordigo estas ege elasta en ĝiaj pluraj niveloj:

vort mal re		ar facil far		[o] [a] [i]		ampleks ig em		o i a
1-a M	.	2-a M	.	3-a M				
1-a M					.	2-a M	.	3-a M
Vorto								

Al Al ĉiu el la du unuaj pozicioj de morfemo vorto, lokucio, sentenco kaj frazo povas subordiĝi, sed neniam al la tria:

Elemento	1-a elemento		2-a elemento		3-a elemento		Rezulto
Vorto	akvo		fal		o		Akvofalo
Vorto			konstrui		o		Konstruo
Lokucio	multaj nacioj		ec		o		multnacieco
Lokucio			bela korpo		a		belkorpa

iu el la du unuaj pozicioj de morfemo vorto, lokucio, sentenco kaj frazo povas subordiĝi, sed neniam al la tria:

Elemento	1-a elemento		2-a elemento		3-a elemento		Rezulto
Vorto	Akvo		fal		o		akvofalo
Vorto			konstrui		o		konstruo
Lokucio	multaj nacioj		ec		o		multnacieco
Lokucio			bela korpo		a		belkorpa

Al ĉiu el la du unuaj pozicioj de morfemo vorto, lokucio, sentenco kaj frazo povas subordiĝi, sed neniam al la tria:

Elemento	1-a elemento		2-a elemento		3-a elemento		Rezulto
Vorto	akvo		fal		o		akvofalo
Vorto			konstrui		o		konstruo
Lokucio	multaj nacioj		ec		o		multnacia
Lokucio			bela korpo		a		belkorpa
Sentenco	sin doni		em		a		sindonema
Santenco			sinmortigi		o		sinmortigo
Frazo	oni diras		ar		o		onidiraro
Frazo			oni diras		o		onidiro

Ĉio en lingvo estas do egalregula kaj do facila, escepte de la ekstremoj: morfemo ne povas subordiĝi kaj frazo ne povas superordiĝi...

Kuritibo, 24.10.2007